

Fondo de Kultura Centro Esperantista
en Biel/Bienne la 15-an de decembro 1968
Claude Gacond, 280-a radioprelego, 1969.12.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La publiko ĝenerale pensas, ke nia internacia lingvo ne progresas. Tamen atenta analizo pri la evoluo de la esperantismo nepre pruvas, ke nia movado multe kreskis dum la dek pasintaj jaroj. Kio donas al la ekstera publiko tiun impreson pri stagnado ?

A.- Estas verŝajne nia diletantismo. Plej ĝenerale la gvidantoj de niaj esperantistaj societoj plenumas siajn funkciojn apud la profesia laboro. Pro tio nia movado estas movado de la dimanĉo kaj de la vespero. Kaj pro tio, kiam poroj malfermiĝas antaŭ ni, tiam neniu el ni kuraĝas ilin penetri.

Cl.- Ni proponas agadojn. Sed kiam oni diras al ni : « *Jes, agu !* » jen ni rezignas pri la projektita laboro, ĉar ĝi signifus troan laboron, kiun ni ne povus plenumi apud la profesia laboro.

A.- Ni multilate troviĝas en situacio, kiu multe similas al tiu de la subevoluintaj landoj. Ni estas popolo sen lernejoj, sen potenco kaj sen prestiĝo.

Cl.- Ni estas popolo de aŭtodidaktuloj. Nia lingvo estas diskonigata nur per tre elementaj kursoj. Nian propran esperantan kulturon ni tre malfacile povas studi. Ne ekzistas kursoj pri ĝi.

A.- Dum jardekoj subevoluintaj popoloj nekonas sian veran situacion. Subite ili tamen ekkonscias pri ĝi. Tiam ili ekagas por akiri sian aŭtonomecon kaj ekludi rolon en la koncerto de la nacioj.

Cl.- La esperanta popolo troviĝas tre verŝajne en tiu etapo de sia historio. Ni ekkonscias, ke ni posedas originalan kulturon kaj ke ni rajtas ludi rolon. Ni ekkonscias pri la grandeco de nia rolo. En niaj gazetoj ekaperas studoj pri nia historio, pri niaj verkistoj, pri niaj pioniroj, pri nia lingvo mem.

A.- Ni eksentas, ke periodo de nia historio finiĝas. Tiu eksento esprimiĝas per ĝenerala malkontenteco pri la funkciado de niaj organizaĵoj. Estas en la lokaj grupoj, ke tiu malkontenteco plej akre sentiĝas.

Cl.- Ĉiuj eksentas, ke babilado en kafejo estas eksa kutimo, ke propagando per elementaj kursoj estas vanaĵo, ke sindono por nia afero estas tempo perdita. Ĉiuj kritikis.

A.- Tamen malmultaj proponas ion. Pro tio ni daŭre babiladas en kaferoj, propagandas por elementaj kursoj kaj perdas tempon por nia afero. Sed ni serĉas eliri tiun situacion.

Cl.- Pasintan zamenhofan tagon, tio estas je la dekkvina de decembro, grupiĝis dekkvino da reprezentantoj de svisaj esperantistaj societoj en la urbo Biel-Bienne. Ilia tagordo estis la kreo de Kultura Centro Esperantista.

A.- Diskutante unue la principon mem de la kreo de kultura centro, ili ĉiuj konstatis la absolutan neceson posedi specon de altlernejo, kiu povus esti centro de studado, kie la esperantistoj kaj ne-esperantistoj povus renkontiĝi por ne nur lerni la elementojn pri nia lingvo, sed sisteme konatiĝi kun nia propra kulturo.

Cl.- Tiam projekto de statuto, kies celo estas ekfunkciigi institucion, kiu povus ludi tiun rolon, estis ekzamenita. Provizora centra komitato estis elektita. Ĝia prezidanto estas sinjoro doktoro August Braun, profesoro en la universitato de Neuchâtel.

Fondo de Kultura Centro Esperantista
en Biel/Bienne la 15-an de decembro 1968
Claude Gacond, 280-a radioprelego, 1969.12.19 & 22

A.- Tiu Kultura Centro Esperantista, kiu naskiĝis je la zamenhofa tago, ne estas nova societo, kiu venas konkurenci la jam ekzistantajn svisajn esperantistajn asociojn. Ĝi estas aŭ volas esti institucio, kiu kunlaborigas tiujn asociojn.

Cl.- Jen, laŭ la statuto akceptita en Biel-Bienne, la celoj de tiu Kultura Centro :

A.- « *Organizi kursojn, seminariojn, kolokvojn, kulturajn manifestaciojn ;*

Cl.- *Reprezenti esperanton en plej diversaj kulturaj medioj ;*

A.- *Rilati kun instru-instancoj kaj Unesko ;*

Cl.- *Helpi la esperantistajn societojn en la urboj, kiuj deziras altigi sian kulturen nivelon ;*

A.- *Fondi esperantistajn societojn en la urboj, kie ne ankoraŭ ekzistas esperantista vivo ;*

Cl.- *Peradi por la internaciaj esperantistaj societoj, kiuj ne ankoraŭ havas sekciojn aŭ delegitojn en Svislando ;*

A.- *Favorigi kontaktojn inter la svisaj esperantistaj societoj mem kaj inter la esperantistaj kaj ne-esperantistaj societoj por diskonigi la esperantan kulturon. »*

Cl.- La fondintoj de tiu Kultura Centro bone konsciis, ke tiuj celoj povos esti plenumitaj, nur se la funkciuloj de tiu institucio povos sin komplete dediĉi al tiu laboro. Estis do decidite provi rikolti la necesan monon por salajri tiujn funkciulojn : konstanta sekretario, tradukistoj, prelegistoj, ktp... Alvokon pri financa helpado sendos dum tiu ĉi printempo la provizora centra komitato.

A.- Se la svisa esperantistaro kapablos garantiĝi minimuman financan fundamenton, tiam la centra komitato povos ektrovi aliajn helpojn. La jaro 1969 estos tiurilate decidiga. Ĝi montros, ĉu la kreo de Kultura Centro Esperantista estas nura revo aŭ io efektivebla. Pro tio ĉio estas provizora : la statuto, la centra komitato, la agado de la Centro.

Cl.- La fondintoj de tiu Kultura Centro volis eviti krei ion, kio poste ne kapablos vivi. Nur post unu jaro de provizora elprovado okaze de la unua jara ĝenerala kunveno tiu kreo povos efektiviĝi.

A.- Do 1969 estos eksperimenta jaro. Ĝi permesos ekzameni, ĉu finance tiu Centro estas realigebla, ĉu publikaj instancoj estas pretaj ĝin subvencii, ĉu la esperantistoj ĝin deziras.

Cl.- Provkursoj kaj provseminarioj estos organizataj. Ili antaŭmontros la laboreblecojn de tiu Kultura Centro. Jen kelkaj ekzemploj :

A.- Dum la semajnfinoj devus okazi kursoj, kie la memlernantoj pri nia lingvo povus veni por perfektigi.

Cl.- Dum aliaj semajnfinoj seminarioj devus renkontigi la gvidantojn de la esperantistaj asocioj.

A.- Kursoj devus formi monitorojn kapablajn ekuzi la aŭdo-vidajn instru-metodojn.

Cl.- Dum la ferioj studsemajnoj devus permesi al la esperantistaro la studon pri la historio de la esperanta movado kaj pri niaj verkistoj.

A.- Ekskursaj semajnfinoj kaj tre fakaj kolokvoj devus povi disvastigi esperanton en rondojn, kiuj ĝis hodiaŭ seninteresiĝis pri la internacia lingvo.

Cl.- Jen kelkaj el la multnombraj taskoj, kiujn devus povi plenumi tiu Centro. La estonteco diros, ĉu la svisa esperantistaro estas kapabla vivi tiu similan institucion.

Fondo de Kultura Centro Esperantista
en Biel/Bienne la 15-an de decembro 1968
Claude Gacond, 280-a radioprelego, 1969.12.19 & 22

A.- Se ĝi estas kapabla tion fari, esperanto tutcerte faros grandan paŝon antaŭen. Se ne, ni restos en tiu malkontentiga situacio, kiu senkuraĝigas la esperantistojn kaj donas al la ekstera publiko la impreson, ke nia afero stagnas.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-